

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報


SUB LA NOVA NOMO!


Nia grupo fariĝis **Esperanto Jokohama**, Neprofitocela Organizo (NPO), en la 23-a de aprilo, 2015. Tio okazis post aprobo fariĝi NPO en la 21-a de aprilo, de la urboficejo de Jokohamo. Niaj ĉiutagaj agadoj ne ŝanĝiĝos, sed ni havas respondecon al la socio, ke ni faros ion utilan al la socio, laŭ leĝo pri NPO.



TIEL OKAZIS

Unu-taga kurso

* apr. 18, 15h00-17h00, gvidita de Wajik Iwanicki. Venis nur unu lernanto.

HAMA-RONDA VESPERO pri Montevideo 60

*apr. 18, 17:00-18:45

En 1954, la Ĝenerala Kunsido de UNESKO en Montevideo (Urugvajo) akceptis rezolucion, favore al Esperanto. Do de la lasta jaro ĝis ĉi

tiu jaro, UEA lanĉas kampanjon Montevideo 60 (MV60) por aprezi ties valoron kaj utiligi tion al nia agado.


Nia rondo havis tempon konforme al tiu ĉi kampanjo. 13 kunvenis, kaj aŭskultis jenajn parolojn.

(1) Fuse Kentarou klarigis pri MV60, utiligante informon el La Revuo Orienta de JEI kaj el Revuo Esperanto de UEA, kun projekcio el komputilo.

(2) Sibayama Zyun'iti suplementis la supran parolon, kaj klarigis pri "Serio Oriento-Okcidento", nome pri libroj pri monde famaj verkoj tradukitaj.

(3) Glauco Pompilio prideseignis la personajn trajtojn de Ivo Lapenna, la protagonisto por sukcesigi Montevidean rezolucion. Pompilio, nun loĝanta en Jokohamo estis iama Konstanta Kongresa Sekretario, nome oficejano de UEA, sub gvido de Ivo Lapenna.

(4) Fuse Kentarou aŭdigis voĉon de Ivo Lapenna el kompakto de liaj paroladoj.



- Eldonas Sibayama Zyun'iti ■ Redaktas Esperanto Jokohama: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Redaktejo: tamtamo@googlegroups.com ■ TTT-ejo: <http://www.esperanto.yokohama/>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

NIAJ PLANOJ

Ĉio suba okazos en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), proksime de la Stacidomo Yokohama.

★ HAMA-RONDAJ VESPEROJ

Maje: pri Ĝemelaj urboj kaj ties rondoj

*majo 16, 17h00-19h00

Junie: Fondokunveno de la Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama

*junio 20, 17h00-19h00

Niaj Klasoj kaj Kursoj

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou. / (4) Rudimenta kurso de Doi Ĉieko (de apr. 25 ĝis jul. 18)

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas “Rakontoj sub la lito” de Antoaneta Klobuĉar. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de “Hanako lernas Esperanton”.



La Statuto de Esperanto Jokohama (parto)

Ĉapitro 1 Ĝeneralaĵoj

Artikolo 1. (nomo) La organizo nomiĝas (japane) *NPO-hoofin Esuperanto Jokohama*, kies Esperanta esprimo estas “Esperanto Jokohama”.

Artikolo 2. (sidejo) La organizo metas sian ĉefsidejon en la urbo Jokohamo en la gubernio Kanagaŭa.

Ĉapitro 2 Celoj kaj entreprenadoj

Artikolo 3. (celoj) La organizo celas kontribui al la monda paco surbaze de la interkompreniĝo pere de la komuna lingvo Esperanto, per entreprenadoj koncernantaj la disvastigon de Esperanto al la civitanoj.

Artikolo 4. (neprofitocelaj aktivadoj laŭ leĝo) Por la nomitaj celoj, la organizo faras jenajn aktivadojn laŭ “la Leĝo Sankcianta Neprofitocelajn Organizojn”.

- (1) por evoluigi socian edukadon
- (2) por progresigi turismon
- (3) por progresigi akademian, kulturen, belartan aŭ sportan agadon
- (4) por protekti homajn rajtojn aŭ evoluigi pacon
- (5) por internacia interhelpo

Artikolo 5. (efektivaj agadoj) Por la nomitaj celoj, la organizo faras jenajn agadojn.

- (1) por reklami kaj dissemi Esperanton
- (2) por subteni lernadon de Esperanto
- (3) por eldoni kaj peri Esperantajn eldonaĵojn
- (4) por asisti alilandajn esperantistojn
- (5) por prezenti kulturon per Esperanto
- (6) por kontribui pacon
- (7) aliaj agadoj necesaj

[poste ellasitaj. La Statuto konsistas el 56 Artikoloj kaj Aldono.]

stabanoj

La estraro ĝis la fino de 2016 konsistas el jenaj personoj.

Prezidanto: s-ro Sibayama Zyun’iti

Vicprezidanto: s-ino Miyazaki Hideko

Estraranoj: s-ro Fuse Kentarou, s-ro Nanba Humiharu, s-ino Doi Ĉieko

Revizoroj: s-ro Karibe Riichi, s-ro Tanigawa Hirosi

Direktoro (ekster la estraro): s-ro Doi Hirokaz

ESEOJ

Ĉu necesas ekzameno de kolorblindeco?



(el materialo liverita de Ara Nobunao)

Doi Ĉieko

Kio estas kolorblindeco?

Homoj kun kolorblindeco vidas kolorojn iom alie. Multaj el ili iom malfacile distingas kolorojn inter ruĝo kaj verdo, sed preskaŭ ĉiuj ne trovas malfacilecon en ĉiutaga vivo. Ili estas nomataj “kolore blindaj aŭ malfacilaj”, kaj do oni miskomprenas, ke ili ne povas vidi kolorojn aŭ distingi kolorojn de semaforoj. Tamen tio estas miskompreno kaj nura supozo, pro kio estiĝis malfacileco okupiĝi pri iuj profesioj aŭ ekzameniĝi en iu kvalifiko.

Antaŭe dum longa tempo (de 1920) oni ekzamenadis kolorblindecon en lernejoj, sed en 2003 tio estis forigita el aferoj ekzamenendaj en lernejoj. Tio tre ĝojigis la koncernajn lernantojn kaj iliajn gepatrojn, ĉar dum multaj jaroj la lernantoj nomataj “kolorblindaj” havis malagrablajn spertojn. Ĉiuj devis ricevi la ekzamenon, kvankam ne estis ia efika kuracado. Tio limigis la lernantojn elekti sian estontan profesion. Ili estis deprimitaj pro tia antaŭjuĝo kaj diskriminacio.

De la ĉesigo de la ekzamenado pasis pli ol 10

jaroj kaj nun denove aperas projekto rekomenci ekzamenadon pri kolorblindeco, kaj la Eduka kaj Scienca Ministerio sendis informojn pri tio al guberniestroj kaj edukaj komitatoj en la tuta lando. La oficisto en la ministrejo atentigas, ke la ekzamenado celas kaŭzi ne diskriminacion sed celas plifaciligi decidon pri profesio ktp.

En okcidentaj landoj viroj kun kolorblindeco okupas 7~8 %, dum en Japanio estas 4,5 % (viroj) kaj 0,2% (virinoj). Sed en okcidentaj landoj ne okazas ekzamenoj al ĉiuj lernantoj kaj ankaŭ ne estas limigo por posteniĝo.

En Japanio estas Societo Forigi Diskriminacion pri Kolorblindeco. Membroj de la societo agadas por ke oni prave taksu kapablon de homoj, kiuj estis kvalifikitaj kiel nenormalaj vidantoj, kaj por ke la socio estu sen diskriminacioj.

Karaj legantoj, se vi informos nin pri la stato de homoj kun kolorblindeco en via lando, ni povos peri tion al koncernaj homoj en Japanio. Antaŭdankon!

Doi Ĉieko



VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (6)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012

Post la Universala Kongreso en 1923, li vojaĝas tra Germanio kaj Francio, konatiĝas kun muzeoj, sciencaj organizaĵoj, porblindulaj institucioj. Kaj en 1924 li partoprenas la Blindulan Kongreson en Vieno, kie estis fondita Tutmonda Asocio de Blindaj Esperantistoj (TABE). Ĝi ekzistas ĝis nun, havante pli ol 500 anojn en la tuta mondo. Ĝia celo estas interkomunikigo kaj interhelpo de blinduloj en ĉiuj landoj, eldono kaj disvastigo de Brajla literaturo.

Post reveno de tiu Kongreso en 1924, Eroŝenko komencas labori en Komunista

Universitato de laboristoj de Oriento, kiel tradukisto de la grupo de japanaj studentoj. Kiam tiu grupo forveturis, li tradukas librojn al la japana, subtenas sin per porokaza laboro. Hejme li ne estas konata verkisto – liajn fabelojn oni konas nur en Oriento; li ne estas fama vojaĝanto, ekvidinta la tutan mondon – ja rakontojn pri liaj vojaĝoj konservis nur esperantaj kaj japanaj revuoj. Hejme li estas simpla blindulo, sama kiel multaj aliaj liaj samsortanoj, kiuj kantas en bazaroj kaj faras brosojn por vendi.

Same kiel en Ĉinio, soleco kaj ĉiutageco

komencas sufokigi tiun fortegan naturon. Sed ĝuste tial estas anime forta tiu homo, ĉar li, dum vivas, neniam fleksiĝas, neniam iĝas mizera, kompatinda, febla. La forteco de animo esprimiĝas en strebo vivi por la aliaj. Kaj tio eblas ĉie kaj ĉiam.

Estas paradokse, ke Eroŝenko ĉiam pledis por malfortaj. La humiligitajn kaj senrajtigitajn li ĉiam konsideris malfortaj, ĉar ilin subjugas fortaj. Sed – ĉu vere fortaj subjugas la aliajn? Ĉu ne respeguliĝas, ne riveligiĝas ĝuste en la strebo al subjugigo la mizereco kaj malgrandeco de animo? Ĉu la forta, vere forta homo ne emas nature – donaci kaj protekti? Kaj nur la malforta volas forpreni de la aliaj, - ĝuste tial, ke li ne havas ion sian propran. Subjugigo kaj perforto estas ĝuste potenco de mizeraj en animo, kiuj, havante nenion en sia propra animo, strebas almenaŭ ion forpreni de la aliaj. Ĝuste la malfortaj gvidas la mondon, elsuĉante la fortojn de fortaj, - ĉar la proprajn

fortojn ili ne havas.

Kaj Eroŝenko estis ne sur la flanko de “mizeruloj” – drinkuloj sen mono kaj stultuloj sen cerbo. Li estis sur la flanko de tiuj fortaj, saĝaj kaj fieraj homoj, el kiuj elsuĉas iliajn fortojn, kune kun ilia vivo, tiuj, kiuj havas fakte nenion, - sed kiuj deziras vivi. Sed vivi ili povas nur je la konto de la aliaj. Jen de kie aperas eterna divido de homoj al Kreantoj kaj Parazitoj. Kaj Eroŝenko volis, ke fortaj homoj forskuu de si parazitojn, kaj fordonu siajn fortojn al spirita konstruado, al plibonigo kaj perfektigo de la vivo, sed ne al subteno de ekzistado de parazitoj. Li mem estis forta homo, kaj li batalis por la rajtoj de la fortaj en tiu mondo, kie regas senindaj kaj mizeraj.

Iam li diris pri si mem: “Kiam mi mortos, oni skribu sur mia tombo nur tri vortojn: vivis, vojaĝis, verkis”. Li vojaĝis, verkis – do, li vivis.
(daŭrigota)



Letero el Nepalo

En la 25a de aprilo okazis granda tertremo en Nepalo. S-ino Doi Ĉieko, eldoninto de nepalaj rakontoj “Punkuino” demandis la originalan nepalan kompilinton, s-ro Razen Manandhar, kaj jen estas lia respondo, en la 1-a de majo.

Koran dankon por via mesaĝo kaj scivolo. Nun mi mallonge skribas.

Laŭ la registaro, mortis pli ol 5600 da homoj. Mia domo ja iomoete difektiĝis, kun rompoj en kelkaj lokoj. Sed mi kredas ke mi povas vivi en ĝi. Danke.

Ĝis antaŭhieraŭ ni dormis ekster nia domo, en malferma loko sub ia tia tegmento, same kiel tendo. Nun ni kredas ke la teruro finiĝas kaj ni dormas en nia domo.

Venis elektro nun hodiaŭ. Mi havis problemon eĉ reŝargi mian poŝtelefonon kaj skribi per poŝtelefono estas ja malfacile.

Morgaŭ mi skribos pli detale en mia blogo. Bonvolu viziti min:

<http://razeno.blogspot.com>

Kore salutas vin,

Razeno



La supre montrita blogo priskribas la aferon pli detale kun multaj fotoj kaj filmetoj. Jen estas kelkaj fotoj el ili. (Redaktoro de Novaĵoj Tamtamas)